

Karlo Markso

Dunglaboro kaj kapitalo

Karlo Markso

Dunglaboro kaj kapitalo

Elgermanigis Vilhelmo Lutermano

kun postparolo de la tradukinto

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso

Dunglaboro kaj kapitalo
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

La verko aperis unue kiel ĉefartikolo en la *Neue Rheinische Zeitung*, n-roj 264, 265, 266, 267 kaj 269 de la 5-a, 6-a, 7-a, 8-a kaj 11-a de aprilo 1849. Ĉi tie elgermanigita laŭ la eldono prizorgita de Engelso de 1891. La de li faritaj esencaj ŝanĝoj kaj kompletigoj aperas ĉi tie piednote.¹

Laŭ: „*Lohnarbeit und Kapital*” von Karl Marx,
Separat-Abdruck aus der „Neuen Rheinischen Zeitung”
vom Jahre 1849, Berlin 1891.

Monda Asembleo Socia (MAS)
Eldonejo: Unesko-Grupo Narbonia, FR-11360 Embres-et-
Castelmaure, 2009
ISBN 978-2-918300-00-7

1 En tiu ĉi Esperanta versio ni tamen ellasas ĉiajn piednotojn kiuj koncernas nur stilajn aŭ pure lingvajn aspektojn. Notoj de la tradukintoj estas signitaj per ties siglo. -vl

Enkonduko

[al Karlo Markso: *Dunglaboro kaj kapitalo* (eldono 1891)]

² De diversaj flankoj oni riproĉis al ni, ke ni ne prezentis la *ekonomiajn kondiĉojn* kiuj konsistigas la materian bazon de la nunaj klasbataloj kaj naciaj bataloj. Ni tuŝis sisteme tiujn kondiĉojn nur tie, kie ili rekte trudiĝis en politikaj kolizioj.

Necesis unue sekvi la klasbatalon en la taga historio kaj empirie pruvi, laŭ la ekzistanta kaj ĉiutage nove kreata historia materialo, ke per la subjugado de la laborista klaso, kiu okazis en februaro kaj marto, estis samtempe venkitaj ĝiaj kontraŭuloj - la burĝaj respublikanoj en Francio, burĝaj kaj kamparanaj klasoj sur la tuta eŭropa kontinentoj, kiuj kontraŭbatalis la feŭdan absolutismon; ke la venko de la „honesta respubliko” en Francio estis samtempe la falo de la nacioj, kiuj estis respondintaj al la februara revolucio per heroaj sendependec-militoj; fine ke Eŭropo per la venko super la revoluciaj laboristoj refalis en sian malnovan duoblan sklavecon, en la *anglan-rusan* sklavecon. La junia batalo en Parizo, la falo de Vieno, la tragi-komedio de la berlina novembro 1848³, la malesperaj klopodoj de Pollando, Italujo kaj Hungarujo, la malsatigo de Irlando - tio estis la ĉefaj elementoj, en kiuj resumiĝis la eŭropa klasbatalo inter burĝaro kaj laborista klaso, ĉe kiu ni pruvis, ke ĉiu revolucia ribelo, kiom ajn malproksima al klasbatalo povas ŝajni ĝia celo, devas fiaski, ĝis kiam la revolucia laborista klaso venkas, ke ĉia socia reformo restas utopio, ĝis kiam la proletara revolucio kaj la feŭda kontraŭrevolucio mezuras sin en *mondmilito*

² *Antaŭmetite*: Kolonjo [Köln], la 4-an de aprilo.

³ *Mankas*: 1848.

per armiloj. En nia prezentado, kiel en la realo, *Belgio* kaj *Svislando* estis la tragikomedijaj karikaturecaj bildoj en la granda historia pentraĵo, la unua la modela ŝtato de burĝa monarĥio, la alia la modela ŝtato de la burĝa respubliko, ambaŭ ŝtatoj kiuj pretendas esti same sendependaj de klasbatalo kiel de la eŭropa revolucio.

Nun, post kiam niaj legantoj vidis evolui la klasbatalon en la jaro 1848 en kolosaj politikaj formoj, estas tempo pli detale priskribi la ekonomiajn kondiĉojn mem, sur kiuj la ekzistado de la burĝaro kaj ties klasa regado baziĝas same⁴ kiel la sklaveco de la laboristoj.

Ni prezentos en tri grandaj partoj: 1. la rilaton de la *dunglaboro al la kapitalo*, la sklavecon de la laboristo, la regadon de la kapitalisto, 2. *la neeviteblan pereon de la mezaj burĝaj klasoj kaj de la tiel nomata burĝa pozicio*⁵ *sub la nuna sistemo*, 3. *la komercan subjugadon kaj ekspluatadon de la burĝaj klasoj de la diversaj eŭropaj nacioj* fare de la despoto de la mondmerkato - *Anglujo*.

Ni provos kiom eble plej simple kaj populare prezenti kaj ne premisi eĉ la plej elementajn nociojn de la politika ekonomio. Ni volas esti kompreneblaj por la laboristoj. Kaj krome en Germanio regas la plej stranga nescio kaj ideokonfuzo pri la plej simplaj ekonomiaj kondiĉoj, de la patentitaj defendantoj de la ekzistantaj situacioj ĝis la *socialistaj miraklistoj* kaj la miskonataj politikaj geniuloj, je kiuj la dispecigita Germanio estas ankoraŭ pli riĉa ol je princoj.

Unue do al la unua demando:

4 *Mankas*: same.

5 kaj de la kamparana pozicio.

Kio estas la salajro?

Kiel ĝi estas determinata?

Se oni demandus laboristojn: Kiom alta estas via salajro? ili respondus, iu: „Mi ricevas 1 markon⁶ por la labortago de mia burĝo”, alia: „Mi ricevas 2 markojn” ktp. Laŭ la diversaj laborbranĉoj, al kiuj ili apartenas, ili indikus diversajn monsumojn, kiujn ili ricevas por⁷ la produktado de certa laboro, ekz-e por la teksado de ulno da teksaĵo aŭ por la enpaĝigo de presfolio, de sia respektiva burĝo. Malgraŭ la diverseco de siaj indikoj, ili ĉiuj konsentus pri la⁸ punkto: La salajro estas la monsumo, kiun la kapitalisto⁹ pagas por certa labortempo aŭ por certa laborliverado.

La kapitalisto, ŝajnas, aĉetas¹⁰ do ilian laboron per mono. Por mono ili *vendas* al li sian laboron. Sed tio estas nur la ŝajno. Tio, kion ili en la realo vendas al la kapitalisto por mono, estas ilia *laborforto*. Tiun laborforton la kapitalisto aĉetas por unu tago, unu semajno, unu monato ktp. Kaj post aĉeti ĝin, li konsumas ĝin, per tio ke li igas la laboristojn labori dum la kontraktita tempo.¹¹ Per la sama sumo¹², per kiu la kapitalisto¹³ aĉetis ilian laborforton¹⁴, ekz-e per 2 markoj, li povintus aĉeti 2 pundojn da sukero aŭ ian ajn alian varon je certa prezo. La 2 markoj, per kiuj li aĉetus 2 pundojn da sukero, estas la *prezo* de

6 Ĉi tie kaj en la sekvo: franko[n].

7 *Enmetite*: certa labortempo aŭ por

8 *Enmetite*: unu.

9 burĝo.

10 La burĝo aĉetas.

11 *La sekvaj kvar frazoj mankas.*

12 monsumo.

13 burĝo.

14 laboron. [*Tiel ankaŭ en la sekvo: en la 1-a eld. aperas „laboro” anst. „laborforto”. -v/*]

la 2 pundoj da sukero. La 2 markoj, per kiu la aĉetis dek-du horojn da uzado de la laborforto¹⁵, estas la prezo de la dekdu-hora laboro. La laborforto estas do varo, ne pli, ne malpli ol la sukero. La unuan oni mezuras per horloĝo, la alian per pesilo.

La laboristoj interŝanĝas sian varon, la laborforton, kontraŭ la varo de la kapitalisto, kontraŭ la mono, kaj tiu interŝanĝo okazas en certa proporcio. Tiom da mono por tiom longa uzado de la laborforto. Por dekduhora teksado 2 markoj. Kaj la 2 markoj, ĉu ili ne reprezentas ĉiujn aliajn varojn, kiujn mi povas aĉeti por 2 markoj? Efektive la laboristo interŝanĝis do sian varon, la laborforton, kontraŭ¹⁶ ĉiuspecaj varoj, nome en certa proporcio. Per tio ke la kapitalisto donis al li 2 markojn, li donis al li tiom da viando, tiom da vestaĵo, tiom da ligno, lumo ktp interŝanĝe kontraŭ lia labortago. La 2 markoj esprimas do la proporcion, en kiu la laborforto estas interŝanĝata kontraŭ aliaj varoj, la *interŝanĝvaloron* de lia laborforto. Tiu interŝanĝvaloro de varo, taksata per *mono*, simple nomiĝas ĝia *prezo*. La *salajro* estas do nur aparta nomo por la prezo de la laborforto, kiun oni kutime nomas la prezo de la laboro¹⁷, por la prezo de tiu si-aspeca varo, kiu havas nenian alian enhavon ol homan karnon kaj sangon.

Ni prenu [kiel ekzemplon] ian ajn laboriston, ekz-e teksiston. La kapitalisto¹⁸ liveras al li la teksmaŝinon kaj la fadenon. La teksisto eklaboras, kaj la fadeno fariĝas teksaĵo. La kapitalisto alproprigas al si la teksaĵon kaj vendas ĝin, je 20 markoj ekz-e. Ĉu la salajro de la teksisto estas *parto* de la teksaĵo, de la 20 markoj, de la produkto de lia laboro? Tute ne. Longe antaŭ ol la teksaĵo estas vendita, eble longe antaŭ ol ĝi estis finteksi-

15 *Anstataŭ* uzado de la laborforto: laboro.

16 *Enmetite*: aliaj.

17 *Mankas*: kiun oni kutime nomas la prezo de la laboro.

18 burĝo.

ta, la teksisto ricevis sian salajron. La kapitalisto pagas do tiun salajron ne per la mono, kiun li ricevos por la teksaĵo, sed per proviza mono. Kiel teksmaŝino kaj fadenon ne estas la produkto de la teksisto, al kiu ili estas liveritaj de la burĝo, same ankaŭ ne la varoj, kiujn li ricevas interŝanĝe por sia varo, la laborforto. Eblis ke la burĝo trovis nenian aĉetanton por sia teksaĵo. Eblis ke li eĉ la salajron li ne ricevis el la vendo de la teksaĵo. Eblas ke li vendas ĝin tre avantaĝe en rilato al la teksadsalajro. Sed ĉio ĉi ne koncernas la teksiston. La kapitalisto aĉetas per parto de sia ekzistanta havaĵo, sia kapitalo, la laborforton de la teksisto tute same kiel li aĉetis per alia parto de sia havaĵo la krudmaterialon - la fadenon - kaj la laborinstrumenton - la teksmaŝinon. Post esti farinta tiujn aĉetojn, kaj al tiuj aĉetoj apartenas la laborforto necesa por produktado de la teksaĵo, li produktas jam nur *per krudmaterialoj kaj laborinstrumentoj kiuj apartenas al li*. Al tiuj lastaj apartenas kompreneble ankaŭ nia bona teksisto, kiu posedas je la produkto aŭ la prezo de la produkto same malmulte kiel la teksmaŝino.

La salajro do ne estas parto de la laboristo je la varo kiun li produktis. La salajro estas la parto de jam ekzistanta varo, per kiu la kapitalisto aĉetas certan sumon de produktiva laborforto.

La laborforto estas do varo, kiun ĝia posedanto, la dunglaboristo, vendas al la kapitalo. Kial li vendas ĝin? Por vivi.

Sed la funkciigo de la laborforto, la¹⁹ laboro, estas la propra vivagado de la laboristo, lia propra vivesprimiĝo. Kaj tiun vivagadon li vendas al iu tria por certigi al si la necesajn vivrimedojn. Lia vivagado estas por li do nur rimedo por povi ekzisti. Li laboras por vivi. Li ne enkalkulas la laboron mem en sian vivon, ĝi estas, male, ofero de lia vivo. Ĝi estas varo kiun li ven-

19 *Mankas*: funkciigo de la laborforto, la.

dis al iu tria. La produkto de lia agado estas do ankaŭ ne la celo de lia agado. Tio, kion li produktas por si mem, estas ne la silko, kiun li teksas, ne la oro, kiun li tiras el la minejo, ne la palaco, kiun li konstruas. Tio, kion li produktas por si mem, estas la salajro, kaj silko, oro, palaco dissolviĝas por li en certan kvanton de vivrimedoj, eble en katunan jakon, en kupran moneron kaj en kelan loĝejon. Kaj la laboristo, kiu dum dek-du horoj teksas, ŝpinas, boras, tornas, konstruas, ŝovelas, martelas ŝtonojn, portadas ktp - ĉu tiu dekduhora teksado, ŝpinado, borado, tornado, konstruado, ŝovelado, ŝtonmartelado estas por li esprimiĝo de lia vivo? Inverse. La vivo komenciĝas tie por li, kie tiu agado ĉesas, ĉetable, sur la benko de drinkejo, en la lito. La dekduhora laborado, male, por li ne havas sencon kiel teksado, ŝpinado, borado ktp, sed kiel *perlaborado*, kiu kondukas lin al la tablo, sur la drinkejan benkon, en la liton. Se la silkovermo ŝpinus, por certigi sian ekzistadon kiel raŭpo, tiam ĝi estus kompleta dungolaboristo.²⁰ La laborforto ne estis ĉiam *varo*. La laboro ne estis ĉiam *dunglaboro*, do *libera laboro*. La *sklavo* ne vendis sian laborforton al la sklavposedanto, same kiel la bovo ne vendas siajn servojn al la kampulo. La sklavo kune kun sia laborforto estas unufoje por ĉiam vendita al sia proprietulo. Li estas *varo*, kiu povas transiri de la mano de unu proprietulo al tiu de alia. Li *mem* estas *varo*, sed lia laborforto ne estas *lia* *varo*. La *servutulo* vendas nur parton de sia laborforto. Ne li ricevas salajron de la proprietulo de la grundo: sed la proprietulo de la grundo ricevas de li tributon.²¹

La *servutulo* apartenas al la grundo kaj donas al la mastro de la grundo fruktojn. La *libera laboristo*, male, vendas sin mem, kaj popece. Li vendas aŭkcie 8, 10, 12, 15 horojn de sia vivo, en unu tago kiel en la alia, al la plejproponanto, al la posedanto

20 Alineo.

21 *Foresto* de alineo.

de la krudmaterialoj, de la laborinstrumentoj kaj vivrimedoj, do al la kapitalisto. La laboristo apartenas nek al proprietulo nek al la grundo, sed 8, 10, 12, 15 horoj de lia ĉiutaga vivo apartenas al tiu kiu aĉetas ilin. La laboristo forlasas la kapitaliston, al kiu li dungigās, tiom ofte kiom li volas, kaj la kapitalisto maldungas lin, tiom ofte kiom li trovas tion bona, ekde kiam li jam ne tiras profiton aŭ ne la intencitan profiton el li. Sed la laboristo, kies sola akirfonto estas la vendo de sia laborforto, ne povas forlasi la *tutan klason de aĉetistoj*, do la *kapitalistan klason*, sen rezigni pri sia ekzistado. Li ne apartenas al tiu aŭ alia kapitalisto, sed al la kapitalista klaso; kaj ĉe tio estas lia problemo efektiviĝi sian vendon, do, en tiu kapitalista klaso trovi aĉetanton.

Antaŭ ol pritrakti pli detale la rilaton inter kapitalo kaj salajro, ni prezentos nun mallonge la plej ĝeneralajn kondiĉojn, kiuj koncernas la determinadon de la salajro.

La *salajro* estas, kiel ni vidis, la prezo de certa varo, de la laborforto. La salajro estas do determinata de la samaj leĝoj kiuj determinas la prezon de ĉiu alia varo.

La demando estas do, *kiel determiniĝas la prezo de varo?*

Per kio determiniĝas la prezo de varo?

Per la konkurenco inter aĉetantoj kaj vendantoj, per la rilato de bezonado al provizado, de postulado al ofertado. La konkurenco, per kiu la prezo de varo estas determinata, estas *triflanka*.

La sama varo estas ofertata de diversaj vendistoj. Kiu vendas varojn de sama boneco plej favorpreze, estas certa cediĝi la ceterajn vendistojn kaj certigi al si la plej grandan vendon. La vendistoj disputas do unu kontraŭ la alia pri la vendokvanto, pri la merkato. Ĉiu el ili volas vendi, kiom eble plej vendi, kaj

laŭeble vendi sola kun ekskludo de la aliaj vendistoj. Pro tio, unu vendas pli favorpreze ol la alia. Okazas do *konkurenco inter la vendistoj*, kiu *suben premas* la prezon de la *varoj* kiujn ili ofertas.

Sed okazas ankaŭ *konkurenco inter la aĉetistoj*, kiu siavice *kreskigas* la prezon de la ofertataj varoj.

Fine okazas *konkurenco inter la aĉetistoj kaj vendistoj*; la unuaj volas aĉeti kiom eble plej malaltpreze, la aliaj volas vendi kiom eble plej altpreze. La rezulto de tiu konkurenco inter aĉetistoj kaj vendistoj dependas de tio, kiel rilatas la antaŭe indikitaj flankoj de la konkurenco, do ĉu la konkurenco en la armeo da aĉetantoj aŭ la konkurenco en la armeo da vendistoj estas pli forta. La industrio kondukas en la batalkampon du amasojn da armeoj unu kontraŭ la alian, el kiuj ĉiu en siaj propraj vicoj inter siaj propraj trupoj batalas. La armeamaso, inter kies trupoj okazas malplej da batado, venkas super la kontraŭa.

Ni supozu, ke en la merkato troviĝas 100 pakaĵoj da kotono kaj samtempe aĉetantoj por 1.000 kotonpakaĵoj. En tiu kazo la postulo estas do dekoble pli granda ol la provizado. La konkurenco inter la aĉetantoj estas do certe tre forta, ĉiu el ili volas akapari unu, laŭeble ĉiujn 100 pakaĵojn por si. Tiu ekzemplo ne estas arbitra hipotezo. En la historio de la komerco ni spertis periodojn de miskresko de kotono, dum kiu kelkaj inter si aliancigitaj kapitalistoj provis aĉeti por si ne 100 pakaĵojn, sed la tutan kotonprovizon de la Tero. Do, en la supozata kazo, unu aĉetisto provas cediĝi la alian per tio ke li proponas relative pli altan prezon por la kotonpakaĵo. La kotonvendistoj, kiuj vidas la trupojn de la malamika armeo en plej akra batalo inter si kaj estas tute certaj pri la vendo de ĉiuj siaj 100 pakaĵoj, gardos sin disputi inter si por malaltigi la kotonprezojn, en momento, en kiu iliaj kontraŭuloj konkurencas inter si por kreskigi ĝin. Do,

subite okazis paco en la armeo de la vendistoj. Ili staras kvazaŭ unu homo kontraŭ la aĉetistoj, filozofe krucas al si la brakojn, kaj iliaj postuloj ne trovus limojn, se ne la proponoj eĉ de la plej trudiĝemaj aĉetemuloj trovus siajn tre difinitajn limojn.

Se do la provizado de varo estas pli malforta ol la postulo de tiu varo, tiam okazas malgranda aŭ eĉ nenia konkurenco inter la vendistoj. En la sama proporcio, kiel tiu konkurenco malaltiĝas, kreskas la konkurenco inter la aĉetantoj. Rezulto: Pli aŭ malpli grava kresko de la varprezoj.

Estas konate, ke la inversa kazo okazas kun inversa rezulto. Grava plio de la provizo super la postulo: senespera konkurenco inter la vendistoj; manko de aĉetantoj: forvendado de la varoj je forĵetaj prezoj.

Sed kion signifas kresko, falo de la prezoj, kion signifas alta prezo, malalta prezo? Sablero estas alta rigardate per mikroskopo, kaj turo estas malalta kompare kun monto. Kaj se la prezo estas determinata per la rilato inter postulo kaj oferto, per kio estas determinata la rilato inter postulo kaj oferto?

Ni turnu nin unue al la unue pasanta civitano. Li pripensos eĉ ne momenton kaj kvazaŭ dua Aleksandro la Granda disbatos tiun metafizikan nodon per la multobligita tabelo. Se la produktado de la varo, kiun mi vendas, kostis 100 markojn, diros li al ni, kaj se mi ricevas per la vendo de tiu varo 110 markojn, kompreneble post jaro - tiam tio estas burĝa, honesta, modesta gajno. Sed se mi ricevas interŝanĝe 120, 130 markojn, tiam tio estas alta gajno; kaj se mi ricevas eĉ 200 markojn, tiam tio estas eksterordinara, enorma gajno. Kio do servas al la civitano kiel *mezuro* de la gajno? La produktadkostoj de lia varo. Se li ricevas interŝanĝe de tiu varo sumon de aliaj varoj kies produktado kostis malpli, tiam li perdis. Se li ricevas interŝanĝe de sia varo sumon de aliaj varoj, kies produktado kostis pli, tiam li

gajnis. Kaj la malkreskon aŭ kreskon de la gajno li kalkulas laŭ la gradoj, en kiuj la interŝanĝvaloro de lia varo estas sub aŭ super nulo - de la produktadkostoj.

Ni vidis ĵus, kiel la ŝanĝiĝanta rilato de postulo kaj oferto produktas jen kreskon, jen malkreskon de la prezoj, jen altajn, jen malaltajn prezojn.²² Se la prezo de varo grave kreskas pro mankanta oferto aŭ pro misproporcie kreskanta postulo, tiam la prezo de iu alia varo nepre malkreskis; ĉar la prezo de varo esprimas ja nur en mono la proporcion, en kiu triaj varoj estas interŝanĝataj kun ĝi. Ekz-e se la prezo de ulno da silkaĵo kreskas de 5 markoj al 6 markoj, tiam la prezo de la arĝento en rilato al la silkaĵoj malkreskis, kaj same malkreskis la prezo de ĉiuj aliaj varoj, kiuj restis kun siaj malnovaj prezoj, en rilato al la silkaĵo. Oni devas interŝanĝe doni pli grandan sumon da ĝi, por ricevi la saman sumon da silkaĵo. Kio estos la sekvo de la kreskanta prezo de varo? Amaso da kapitaloj ĵetos sin sur la floran-tan industribranĉon, kaj tiu enmigrado de kapitaloj en la regionon de la preferata industrio daŭros tiom longe, ĝis kiam ĝi donas la kutimajn profitojn aŭ, pli ĝuste, ĝis kiam la prezo de ĝiaj produktoj malkreskas pro superproduktado sub la produktadkostojn.

Inverse. Se la prezo de varo falas sub siajn produktadkostojn, tiam la kapitaloj retiriĝos el la produktado de tiu varo. Kun la escepto de tiu kazo, en kiu industribranĉo ne estas plu laŭtempa, do devas pereji, per tiu fuĝo de la kapitaloj la produktado de tia varo, do ĝia oferto, malkreskos tiom longe, ĝis kiam ĝi laŭas la postulon, do ĝia prezo realtiĝas ĝis la alteco de ĝiaj produktadkostoj, aŭ pli ĝuste, ĝis kiam la oferto malaltiĝis sub la postulon, do ĝis kiam ĝia prezo kreskas ree super ĝiajn pro-

22 Alineo.

duktadkostojn, *ĉar la kuranta prezo*²³ *de varo staras ĉiam super aŭ sub ĝiaj produktadkosto.*

Ni vidas kiel la kapitaloj konstante el- kaj en-migras, el la kampo de unu industrio en tiun de alia. Alta prezo okazigas tro fortan enmigradon kaj malalta prezo tro fortan elmigradon.

Ni povus montri el alia vidpunkto, kiel ne nur la oferto, sed ankaŭ la postulo estas determinata de la produktadkosto. Se tio tro malproksimigus nin de nia temo.

Ni ĵus vidis, kiel la ŝanceliĝoj de oferto kaj postulo ĉiam denove reduktas la prezon de varo al la produktadkosto. Estas vere ke la reala prezo de varo staras ĉiam super aŭ sub la produktadkosto; sed la kreskado aŭ malkreskado kompensas sin reciproke, tiel ke ene de donita tempo, fluson kaj malfluson de la industria tajdo kunkalkulite, la varoj interŝanĝiĝas kongruaj al siaj produktadkosto, ilia prezo do determinatas de iliaj produktadkosto.

Tiu prezdeteminado per la produktadkosto ne kompreneblas en la senco de la ekonomikistoj. La ekonomikistoj diras, ke la *mezuma prezo* de la varoj egalas al la produktadkosto; ke tiu estas la *leĝo*. La anarĥian moviĝon, per kiu la kresko kompensatas per la malkresko kaj la malkresko per la kresko, ili konsideras hazardo. Oni povus samrajte, kiel okazis de aliaj ekonomikistoj, konsideri la ŝanceliĝojn kiel leĝon²⁴ kaj la determinadon per la produktadkosto kiel hazardon. Sed nur tiuj ŝanceliĝoj, kiuj, ĉe pli detala rigardo, sekvigas la plej terurajn neniigojn kaj kvazaŭ tertremoj tremigas la burĝan socion en ties fundamentoj, nur tiuj ŝanceliĝoj determinas en sia sinsekvo la prezon per la produktadkosto. La suma moviĝo de tiu malordo estas ĝia ordo. En la okaziĝo de tiu industria anarĥio, en tiu cirkla

²³ merkatprezo.

²⁴ kiel la leĝon.

moviĝo la konkurenco kompensas por tiel diri unu petolaĵon per la alia.

Ni vidas do: La prezo de varo estas determinata per ĝiaj produktadkostoj tiamaniere, ke la tempoj, dum kiuj la prezo de iu varo kreskas super la produktadkostoj, estas kompensataj de la tempoj dum kiuj ĝi malkreskas sub la produktadkostoj, kaj inverse. Tio validas kompreneble ne por unuopa industriprodukto, sed nur por la tuta industribranĉo. Ĝi validas do ankaŭ ne por la individua industriisto, sed nur por la tuta klaso de industriistoj.

La determinado de la prezo per la produktadkostoj egalas al la determinado de la prezo per la labortempo, kiu necesas por la produktado de varo, ĉar la produktadkostoj konsistas el 1. krudmaterialoj kaj eluziĝo de instrumentoj, do el industriproduktoj, kies produktado kostis certan sumon da labortagoj, kiuj do prezentas certan sumon da labortempo, kaj 2. el rekta laboro, kies mezuro estas ĝuste la tempo.

La samaj ĝeneralaj leĝoj, kiuj reguligas la prezon de la varoj ĝenerale, reguligas kompreneble ankaŭ la *salajron*, la *prezon de la laboro*.

La salajro jen kreskas, jen malkreskas, laŭ la rilato de postulo kaj oferto, laŭ tio kiel fariĝas la konkurenco inter la aĉetantoj de la laborforto, la kapitalistoj, kaj la vendantoj de la laborforto, la laboristoj. Al la ŝanceliĝoj de la varprezoj ĝenerale respondas la ŝanceliĝoj de la salajro. *Sed ene de tiuj ŝanceliĝoj la prezo de la laboro estas determinata per la produktadkostoj, per la labortempo necesa por produkti tiun varon, la laborforton.*

Nu, kiuj estas la produktadkostoj de la laborforto?

Ili estas la kostoj necesaj por konservi la laboriston kiel lab-

oriston kaj por eduki lin laboristo.

Do, ju malpli da edukadotempo necesas por laboro, des malpli altaj estas la produktadkostoj de la laboristo, des malpli alta estas la prezo de lia laboro, lia salajro. En la industribranĉoj kie necesas preskaŭ nenia lerntempo kaj kie sufiĉas la nura korpa ekzisto de la laboristo, la produktadkostoj necesaj por lia produktado limiĝas preskaŭ ekskluzive al la varoj necesaj por konservi lin je laborkapabla²⁵ vivo. La *prezo de lia laboro* determiniĝas do per la *prezo de la necesaj vivrimedoj*.

Tamen aldoniĝas ankoraŭ alia konsidero. La fabrikisto kiu kalkulas siajn produktadkostojn kaj poste la prezon de la produktoj, enkalkulas la eluziĝon de la laborinstrumentoj. Se maŝino kostas al li ekz-e 1.000 markojn kaj se tiu maŝino eluziĝas en dek jaroj, tiam li metas 100 markojn jare en la prezon de la varo, por povi, post dek jaroj, anstataŭigi la eluzitan maŝinon per nova. Same necesas enkalkuli en la produktadkostojn de la simpla laborforto la kostojn de reproduktado, per kiuj la laborista raso estas kapabligita pliiĝi kaj anstataŭigi eluzitajn laboristojn per novaj. La eluziĝo de laboristo estas do same enkalkulata kiel la eluziĝo de maŝino.

La produktadkostoj de simpla laborforto kongruas do kun la *kostoj de ekzistado kaj reproduktado de la laboristo*. La prezo de tiuj ekzistad- kaj reproduktad-kostoj konsistigas la salajron. La tiel determinata salajro nomiĝas la *minimuma salajro*. Tiu minimuma salajro validas, kiel la prezdeteminado de varoj per la produktadkostoj ĝenerale, ne por la *unuopa individuo*, sed por la *specio*. Unuopaj laboristoj, milionoj da laboristoj, ne ricevas sufiĉe por povi ekzisti kaj reproduktiĝi; *sed la salajro de la tuta laborista klaso* kompensis ene de siaj ŝanceliĝoj al tiu minimumo.

²⁵ *Mankas*: laborkapabla.

Nun, post kiam ni interkompreniĝis pri la plej ĝeneralaj leĝoj kiuj reguligas la salajron kaj la prezon de ĉia alia varo, ni povas pli speciale pritrakti nian temon.

²⁶ La kapitalo konsistas el ĉiaspecaj krudmaterialoj, laborinstrumentoj kaj vivrimedoj, kiuj estas uzataj por produkti novajn krudmaterialojn, novajn laborinstrumentojn kaj novajn vivrimedojn. Ĉiuj ĉi eroj estas kreaĵoj de la laboro, produktoj de la laboro, *akumulita laboro*. Akumulita laboro, kiu servas kiel rimedo por nova produktado, estas kapitalo.

Tiel diras la ekonomikistoj.

Kio estas nigrula sklavo? Homo de nigra raso. La unua klarigo valoras la alian.

Nigrulo estas nigrulo. En certaj kondiĉoj li fariĝas sklavo. Kotonŝpinmaŝino estas maŝino por kotonŝpinado. Nur en certaj kondiĉoj ĝi fariĝas *kapitalo*. Elŝirita el tiuj kondiĉoj, ĝi ne estas kapitalo, same kiel oro per si mem ne estas *mono* aŭ sukero la sukerprezo.

En la produktado la homoj efikas²⁷ ne nur al la naturo, sed ankaŭ al si reciproke²⁸. Ili produktas nur per tio ke ili en certa maniero kunefikas kaj reciproke interŝanĝas siajn agojn. Por produkti, ili eniras en certajn rilatojn kaj kondiĉojn unu al la aliaj, kaj nur ene de tiuj sociaj rilatoj kaj kondiĉoj okazas ilia efikado al la²⁹ naturo, okazas la produktado.

Kompreneble, laŭ la specifeco de la produktrimedoj tiuj sociaj rilatoj, en kiujn la produktantoj eniras reciproke, la kondiĉoj, sub kiuj ili interŝanĝas siajn agojn kaj partoprenas en la su-

²⁶ *Antaŭmetite*: *Kolonjo, la 6-an de aprilo.

²⁷ rilatas.

²⁸ *Mankas*: sed ankaŭ al si reciproke.

²⁹ ilia rilato al.

ma takto de la produktado, estas diversaj. Per la invento de nova militinstrumento, de la fajropafilo, la tuta interna organiziĝo de la armeo nepre ŝanĝiĝis, la kondiĉoj ŝanĝiĝis, en kiuj individuoj povas fariĝi armeo kaj efiki kiel armeo, ŝanĝiĝis ankaŭ la interrilato de diversaj armeoj.

La sociaj kondiĉoj, en kiuj la individuoj produktas, *la sociaj produktadkondiĉoj do ŝanĝiĝas, ŝanĝiĝas kun la ŝanĝiĝo kaj evoluo de la materiaj produktadrimedoj, de la produktadfortoj. La produktadkondiĉoj en sia tutaĵo konsistigas tion kion oni nomas la sociaj kondiĉoj, la socio, kaj pli precize socio sur certa, historia evoluŝtupo*, socio kun siaspeca, distinga karaktero. La antikva socio, la *feŭda* socio, la *burĝa* socio estas tiaj tutaĵoj de produktadkondiĉoj, kiuj ĉiu signas samtempe apartan evoluŝtupon en la historio de la homaro.

Ankaŭ la *kapitalo* estas socia produktadkondiĉo. Ĝi estas *burĝa produktadkondiĉo*, produktadkondiĉo de la burĝa socio. La vivrimedoj, la laborinstrumentoj, la krudmaterialoj el kiuj la kapitalo konsistas, ĉu ili ne estas produktitaj kaj akumulitaj sub donitaj sociaj kondiĉoj, en certaj sociaj rilatoj? Ĉu ili ne estas uzataj sub donitaj sociaj kondiĉoj, en certaj sociaj rilatoj por nova produktado? Kaj ĉu ĝuste tiu certa socia karaktero ne *kapitaligas* la produktojn, kiuj servas por nova produktado?

La kapitalo konsistas ne nur el vivrimedoj, laborinstrumentoj kaj krudmaterialoj, ne nur el materiaj produktoj; ĝi konsistas same el *interŝanĝvaloroj*. Ĉiuj produktoj, el kiuj ĝi konsistas, estas *varoj*. La kapitalo estas do ne nur sumo de materiaj produktoj, ĝi estas sumo de varoj, de interŝanĝvaloroj, *de sociaj grandoj*.

La kapitalo restas sama, ĉu ni anstataŭigas lanon per kotono, cerealon per rizo, fervojojn per vaporŝipoj, kondiĉe nur ke la kotono, la rizo, la vaporŝipoj - la korpo de la kapitalo - havu la

saman interŝanĝvaloron, la saman prezon kiel la lano, la cerealo, la fervojoj, en kiu ĝi enkorpiĝis antaŭe. La korpo de la kapitalo povas konstante ŝanĝiĝi, sen ke la kapitalo suferus pro tio la plej etan ŝanĝon.

Sed kvankam ĉiu kapitalo estas sumo de varoj, do de interŝanĝvaloroj, ne ĉiu sumo de varoj, de interŝanĝvaloroj estas kapitalo.

Ĉiu sumo de interŝanĝvaloroj estas interŝanĝvaloro, Ĉiu unuopa interŝanĝvaloro estas sumo de interŝanĝvaloroj. Ekz-e domo, kiu valoras 1.000 markojn, estas interŝanĝvaloro de 1.000 markoj. Peco da papero, kiu valoras 1 pfenigon³⁰, estas sumo de interŝanĝvaloroj de 100/100 pfenigoj. Produktoj, kiuj interŝanĝeblas kun aliaj, estas varoj. La certa proporcio, en kiu ili estas interŝanĝeblaj, konsistigas ilian *interŝanĝvaloron* aŭ, esprime per mono, ilian *prezon*. La kvanto de tiuj produktoj ne povas ŝanĝi ilian econ esti *varo* aŭ prezenti *interŝanĝvaloron* aŭ havi certan *prezon*. Ĉu arbo estas granda aŭ malgranda, ĝi restas arbo. Se ni interŝanĝas feron per kilogramoj aŭ per tunoj³¹, ĉu tio ŝanĝas ĝian econ: esti varo, interŝanĝvaloro? Laŭ ĝia maso ĝi estas varo de pli aŭ malpli da valoro, de pli alta aŭ pli malalta prezo.

Kiel sumo de varoj, de interŝanĝvaloro fariĝas kapitalo?

Per tio, ke ĝi konservas sin kiel sendependa socia potenco, do kiel la potenco de parto de la socio kaj pliiĝas per la *interŝanĝo kontraŭ la rekta, vivanta laborforto*. La ekzisto de klaso, kiu posedas nenion alian ol la laborkapablo, estas nepra antaŭkondiĉo de la kapitalo.

30 Ĉi tie kaj en la sekvo: centimon.

31 En la originalo: in Loten oder in Zentnern (per lodoj aŭ per funtocentoj. -vl

Nur la regado de la akumulita, pasinta, konkretiĝinta laboro super la rekta, vivanta laboro kapitaligas la akumulitan laboron.

La kapitalo ne konsistas el tio ke akumulita laboro servas al la vivanta laboro kiel rimedo por nova produktado. Ĝi konsistas el tio ke la viva laboro servas al la akumulita laboro kiel rimedo por konservi kaj pliigi ĝian interŝanĝvaloron.

Kio okazas en la interŝanĝo inter kapitalisto kaj dunglaboristo?³² La laboristo ricevas interŝanĝe kontraŭ sia laborforto vivrimedojn, sed la kapitalisto ricevas interŝanĝe kontraŭ siaj vivrimedoj laboron, la produktivan laboron de la laboristo, la krea forton, per kiu la laboristo ne nur anstataŭigas tio kion li konsumas, sed *donas al la akumulita laboro pli grandan valoron ol kiun ĝi posedis antaŭe*. La laboristo ricevas parton de la ekzistantaj vivrimedoj de la kapitalisto. Por kio servas al li tiuj vivrimedoj? Por rekta konsumado. Sed ekde kiam mi konsumas vivrimedojn, mi perdas ilin por ĉiam, escepte se mi uzas la tempon, en kiu tiuj rimedoj vivtenas min, por produkti novajn vivrimedojn, por krei dum la konsumado per mia laboro novajn valorojn anstataŭ la valoroj pereantaj en la konsumado. Sed ĝuste tiun reproduktan forton la laboristo ja forcedas al la kapitalo interŝanĝe kun la ricevitaj vivrimedoj. Li do perdis ilin por si mem.

Ni prenu ekzemplon: Farmisto donas al sia taglaboristo 5 arĝentogroŝojn tage. Por la 5 arĝentogroŝoj tiu laboras sur la kampo de la farmisto la tutan tagon kaj tiel certigas al li enspezon de 10 arĝentogroŝoj. La farmisto ricevas ne nur anstataŭon de la valoroj, kiujn li devas cedi al la taglaboristo; li duobligas ilin. La 5 arĝentogroŝojn, kiujn li donis al la taglaboristo, li uzis, konsumis do fruktodone, produktive. Li aĉetis por la 5 arĝentogroŝoj ĝuste la laboron kaj forton de la taglaboristo, kiu

32 dunglaboro.

produktas terproduktaĵojn de duobla valoro kaj faras el 5 arĝentogroŝoj 10 arĝentogroŝojn. Sed la taglaboristo ricevas anstataŭ sia produkta forto, kies efikojn li ĵus cedis al la farmisto, 5 arĝentogroŝojn, kiujn li interŝanĝas kontraŭ vivrimedoj, kaj tiujn vivrimedojn li konsumas pli aŭ malpli rapide. La 5 arĝentogroŝoj estas do konsumitaj duoble, reproduktive por la kapitalo, ĉar ili interŝanĝiĝis kontraŭ laborforto kiu produktis 10 arĝentogroŝojn, neproduktive por la laboristo, ĉar ili interŝanĝiĝis kontraŭ vivrimedoj, kiu malaperis por ĉiam kaj kies valoron li povas nur rericevi per ripetado de la sama interŝanĝo kun la farmisto. *La kapitalo do antaŭkondiĉas la dunglaboron, la dunglaboro antaŭkondiĉas la kapitalon. Ili antaŭkondiĉas sin reciproke: ili produktas sin reciproke.*

Laboristo en kotonfabriko, ĉu li produktas nur kotonŝtofojn? Ne, li produktas kapitalon. Li produktas valorojn, kiuj servas denove por komandi lian laboron kaj, pere de ĝi, krei novajn valorojn.

La kapitalo povas pliiĝi nur per tio ke ĝi interŝanĝiĝas kontraŭ laborforto, kreas dunglaboron. La laborforto de la salajrulo³³ povas interŝanĝiĝi kontraŭ kapitalo nur per tio ke ĝi pliiĝas la kapitalon, fortigas la potencon, kies sklavo ĝi estas. *Pliigo de la kapitalo estas do pliigo de la proletaro, do de la laborista klaso.*³⁴

La intereso de la kapitalisto kaj de la laboristo estas do la sama, asertas la burĝoj kaj iliaj ekonomikistoj. Kaj efektive! La laboristo pereas, se la kapitalo ne dungas lin. La kapitalo pereas, se ĝi ne ekspluatas la laborforton, kaj por ekspluati ĝin, ĝi devas aĉeti ĝin. Ju pli rapide la kapitalo destinita al produktado, la produktiva kapitalo, pliiĝas, ju pli floranta pro tio la indu-

33 Anstataŭ *La laborforto de la salajrulo*: La salajrolaboro.

34 de la laboristaj klasoj.

strio estas, ju pli la burĝaro riĉigas sin, ju pli bone fartas la entrepreno, des pli da laboristoj bezonas la kapitalisto, des pli kare vendas sin la laboristo.

La nepre necesa kondiĉo por tolerebla situacio de la laboristo *estas do kiom eble plej rapida kresko de la produktiva kapitalo.*

Sed kio estas kresko de la produktiva kapitalo? Kresko de la potenco de la akumulita laboro super la viva laboro. Kresko de la potenco de la burĝaro super la laboranta klaso. Se la dunglaboro produktas la ĝin regantan fremdan riĉaĵon, la al ĝi malamikan potencon, la kapitalon, tiam refluas al ĝi dungrimedoj, do vivrimedoj, sub la kondiĉoj, ke ĝi fariĝu denove parto de la kapitalo, levilo kiu denove katapultas ĝin en la rapidigitan moviĝon de kresko.

La interesoj de la kapitalo kaj la interesoj de la laboristoj³⁵ estas la samaj, signifas nur: Kapitalo kaj dunglaboro estas du flankoj de unu sama rilato. Ili antaŭkondiĉas sin reciproke, kiel uzuristo kaj malŝparulo antaŭkondiĉas sin reciproke.

Tiom longe kiom la dunglaboristo estas dunglaboristo, lia sorto dependas de la kapitalo. Jen la multe glorata komuneco de la intereso de laboristo kaj kapitalisto.

³⁶Se la kapitalo kreskas, tiam kreskas la kvanto da dunglaboro, tiam kreskas la kvanto da dunglaboristoj, koncize: La regado de la kapitalo etendiĝas super pli granda amaso da individuoj. Kaj ni supozu la plej favoran kazon: Se la produktiva kapitalo kreskas, tiam kreskas la postulo de laboro. Kreskas do la prezo de la laboro, la salajro.

Domo povas esti granda aŭ malgranda, tiom longe kiom la

³⁵ de la laboro.

³⁶ *Antaŭmetite:* *Kolonjo, la 7-an de aprilo.

Ĉirkaŭaj domoj estas ankaŭ malgrandaj, ĝi kontentigas ĉiujn sociajn postulojn pri loĝejo. Sed se apud la malgranda domo leviĝas palaco, la malgranda domo ŝrumpas al kabano. La malgranda domo pruvas nun, ke ĝia posedanto povas pretendi neniajn aŭ nur la plej etajn postulojn; kaj ĝi povas iom post iom ajne altiĝi, se la najbara palaco altiĝas laŭ sama aŭ eĉ pli granda mezuro, tiam la loĝanto en la relative malgranda domo sentos sin ĉiam pli malbonfarta, nekontentigita, premata en siaj kvar vandoj.

Sentebla kresko de salajro antaŭkondiĉas rapidan kreskon de la produktiva kapitalo. Rapida kresko de la produktiva kapitalo sekvigas same rapidan kreskon de la riĉaĵo, de la lukso, de la sociaj bezonoj kaj de la sociaj ĝuoj. Kvankam do la ĝuoj de la laboristo altiĝis, la socia kontentiĝo, kiun ili donas, malaltiĝis kompare kun la pliiĝintaj ĝuoj de la kapitalistoj, kiuj estas nealireblaj por la laboristo, kompare kun la evolustadio de la socio entute. Niaj bezonoj kaj ĝuoj fontas el la socio; pro tio ni mezuras ilin ĉe la socio; ni ne mezuras ilin ĉe la objektoj de ilia kontentigo. Ĉar ili estas sociaj, ili estas relativaj.

La salajro mezuriĝas tute ne nur per la amaso da varoj kiujn mi povas interŝanĝi por ĝi. Ĝi entenas diversajn rilatojn.

Tio, kion la laboristoj unue ricevas por sia laborforto, estas certa sumo da mono. Ĉu la salajro estas determinita nur per tiu monprezo?

En la 16-a jarcento la en Eŭropo cirkulanta oro kaj arĝento pliiĝis sekve al la malkovro de pli riĉaj kaj pli facile prilabor- eblaj minejoj³⁷ en Ameriko. La valoro de oro kaj arĝento falis do en rilato al la ceteraj varoj. La laboristoj ricevis daŭre la saman kvanton da mona arĝento por sia laborforto. La monprezo

37 *Mankas*: pli riĉaj kaj pli facile prilaboreblaj minejoj en.

de ilia laboro restis la sama, kaj tamen ilia salajro malkreskis, ĉar interŝanĝe por la sama kvanto da arĝento ili ricevis malpli grandan sumon de aliaj varoj. Tiu estis unu el la cirkonstancoj kiuj akcelis la kreskadon de la kapitalo, la supreniron de la burĝaro en la 16-a³⁸ jarcento.

Ni prenu alian kazon. Dum la vintro 1847 sekve al misrikolto signife kreskis la plej nemalhaveblaj vivrimedoj, cerealo, viando, butero, fromaĝo ktp. Ni supozu ke la laboristoj daŭre ricevis la saman sumon da mono por sia laborforto. Ĉu ilia salajro ne malaltiĝis? Jes ja. Por la sama mono ili ricevis interŝanĝe malpli da pano, da viando ktp. Ilia salajro malaltiĝis, ne ĉar la valoro de la arĝento malpliiĝis, sed ĉar la valoro de la vivrimedoj pliiĝis.

Ni supozu fine, ke la monprezo de la laboro restas sama, dum la prezoj de ĉiuj terkulturaj kaj manufakturaj varoj, pro aplikado de novaj maŝinoj, pro pli favora sezono ktp, malaltiĝis. Por la sama mono la laboristoj povas nun aĉeti pli da ĉiaspecaj varoj. Ilia salajro do altiĝis, ĝuste ĉar ties monvaloro ne ŝanĝiĝis.

La monprezo de la laboro, la nominala salajro, do ne kongruas kun la reala salajro, do kun la sumo de varoj ricevataj interŝanĝe kun la salajro. Do, se ni parolas pri kresko aŭ malkresko de la salajro, ni devas konsideri ne nur la monprezon de la laboro, la nominalan salajron.

Sed nek la nominala salajro, do la monsumo, por kiu la laboristo vendas sin al la kapitalisto, nek la reala salajro, do la sumo de varoj, kiujn li povas aĉeti por tiu mono, elĉerpas la rilatojn entenatajn en la salajro.

La salajro estas antaŭ ĉio krome determinata per sia rilato al

38 *Preseraro*: 18-a.

la gajno, la profito de la kapitalisto - relativa salajro.

La reala salajro esprimas la prezon de la laboro en rilato al la prezo de la ceteraj varoj, sed la relativa salajro la parton de la rekta laboro en la de ĝi nove kreita valoro en rilato de ties parto kiun ricevas la akumulita laboro, la kapitalo.³⁹

Ni diris supre, paĝo 9⁴⁰: „*La salajro do ne estas parto de la laboristo je la varo kiun li produktis. La salajro estas la parto de jam ekzistanta varo, per kiu la kapitalisto aĉetas certan sumon de produktiva laborforto*”. Sed tiun salajron la kapitalisto devas anstataŭigi el la prezo, je kiu li vendas la produkton faritan de la laboristo; li devas anstataŭigi ĝin tiel, ke restas al li ĝenerale ankoraŭ kromaĵo super liaj elspezitaj produktadokostoj, profito. La vendoprezo de la varo produktita de la laboristo dividiĝas por la kapitalisto en tri partojn: *unue* la anstataŭaĵon de la prezo de la krudmaterialoj antaŭpagitaj de li, apud la anstataŭaĵo de la maŝinoj kaj aliaj laborrimedoj; *due* en la anstataŭaĵon de la salajro antaŭpagita de li *kaj trie* en la kromaĵon, la profiton de la kapitalisto. Dum la unua parto anstataŭas nur *antaŭe ekzistantajn valorojn*, estas klare ke kaj la anstataŭaĵo de la salajro kaj la kromaĵa profito de la kapitalisto estas ĝenerale prenataj el la *nova valoro kreita de la laboro de la laboristo* kaj aldonita al la krudmaterialoj. Kaj *en tiu senco* ni povas kompari kaj la salajron kaj la profiton, por kompari unu kun la alian, kiel partojn de la produkto de la laboristo.⁴¹

La reala salajro povas resti sama, ĝi povas eĉ kreski, kaj la

39 *La alineo tekstas*: La reala salajro esprimas la prezon de la laboro en rilato al la prezo de la ceteraj varoj, sed reala salajro la prezon de la rekta laboro en rilato al la prezo de la akumulita laboro, la relativan valoron de salajro kaj kapitalo, la reciprokan valoron de la kapitalistoj kaj laboristoj.

40 paĝo 14

41 *Mankas la tuta alineo*.

relativa salajro povas tamen malkreski.

Ni supozu ekz-e, ke la prezoj de ĉiuj vivrimedoj malaltiĝis je $\frac{2}{3}$, dum la tagsalajro malaltiĝis nur je $\frac{1}{3}$, do ekz-e de 3 markoj al 2 markoj. Kvankam la laboristo disponas per tiuj 2 markoj pri pli granda sumo da varoj ol antaŭe per 3 markoj, lia salajro tamen malkreskis en rilato al la gajno de la kapitalisto. La profito de la kapitalisto (ekz-e de la fabrikisto) pliiĝis je unu marko, do, por malpli alta sumo da interŝanĝvaloroj kiun li pagas al la laboristo, la laboristo devas produkti pli grandan sumon da interŝanĝvaloroj ol antaŭe. La parto⁴² de la kapitalisto en rilato al la parto⁴³ de la laboro kreskis. La disdivido de la socia riĉaĵo inter kapitalo kaj laboro fariĝis ankoraŭ pli malegala. La kapitalisto komandas per la sama kapitalo pri pli granda kvanto da laboro. La potenco de la kapitalista klaso super la laborista klaso kreskis, la socia pozicio de la laboristo pli malboniĝis, malaltiĝis je unu ŝtupo sub tiu de la kapitalisto.

Kiu estas la ĝenerala leĝo, kiu determinas la malaltiĝon kaj altiĝon de la salajro kaj de la profito en ilia reciproka proporcio?

Ili staras en inversa proporcio. La parto de la kapitalo, la profito, kreskas en la sama proporcio, en kiu la parto de la laboro, la tagsalajro, malkreskas, kaj inverse. La profito kreskas laŭ la mezuro laŭ kiu la salajro malkreskas, ĝi malkreskas laŭ la mezuro laŭ kiu la salajro kreskas.

Oni eble kontraŭmetus, ke la kapitalisto povas gajni per avantaĝa interŝanĝo de siaj produktoj kun aliaj kapitalistoj, per kresko de postulo de lia varo, ĉu sekve al malfermo de novaj merkatoj, ĉu sekve al momente pli altaj bezonoj sur la malnovaj merkatoj ktp; ke la profito de la kapitalistoj povas do pliiĝi

42 valoro.

43 valoro.

per malprofitigo de triaj kapitalistoj, sendepende de kresko aŭ malkresko de la salajro, de la interŝanĝvaloro de la laborforto; aŭ ke la profito de la kapitalisto povas ankaŭ kreski per plibonigo de la laborinstrumentoj, nova aplikado de la naturfortoj ktp.

Unue oni devas koncedi, ke la rezulto restas la sama, kvankam ĝi estis atingita sur inversa vojo. La profito kreskis ne ĉar la salajro malkreskis, sed la salajro malkreskis, ĉar la profito kreskis. La kapitalisto aĉetis per la sama sumo da fremda⁴⁴ laboro pli grandan sumon da interŝanĝvaloroj, sen por tio pagi pli alte la laboron; tio signifas do ke la laboro estas malpli alte pagata en rilato kun la neta profito per kiu ĝi provizas la kapitaliston.

Krome ni memorigas, ke malgraŭ la ŝanceliĝoj de la varprezoj la mezuma prezo de ĉiu varo, la proporcio, en kiu ĝi interŝanĝiĝas kun aliaj varoj, estas determinata de ĝiaj produktadkostoj. La malprofitigoj ene de la kapitalista klaso do nepre kompenŝiĝas. La plibonigo de la maŝinaro, la nova aplikado de naturfortoj en la servo de la produktado kapabligas en donita labortempo, per la sama sumo da laboro kaj kapitalo krei pli grandan mason da produktoj, sed tute ne pli grandan mason da interŝanĝvaloroj. Se mi per aplikado de la ŝpinmaŝino povas liveri duoble da ŝpinaĵo en unu horo ol antaŭ ĝia invento, ekzemple cent pundojn anstataŭ kvindek, tiam mi ricevas por tiuj cent pundoj, post iom da tempo,⁴⁵ interŝanĝe ne pli da varoj ol antaŭe por kvindek, ĉar la produktadkostoj malaltiĝis duone aŭ ĉar mi per la samaj kostoj povas liveri duoblan produkton.

Fine, en kiu ajn proporcio la kapitalista klaso, la burĝaro, ĉu de unu lando, ĉu de la tuta mondmarkato, dividas inter si la netan enspezon, la tuta sumo de tiu neta enspezo estas ĉiufoje nur

44 *Mankas*: fremda.

45 *Mankas*: post iom da tempo.

la sumo per kiu la akumulita laboro ĝenerale estas pliigita per la rekta laboro. Tiu tuta sumo kreskas do en la proporcio, en kiu la laboro pliigas la kapitalon, do en la proporcio en kiu la profito kreskas kontraŭ la salajro.

Ni vidas do, ke eĉ, se ni restas *ene de la rilato de kapitalo kaj salajro, la interesoj de la kapitalo kaj la interesoj de la salajro rekte kontraŭstaras unu la alian.*

Rapida kresko de la kapitalo egalas al rapida kresko de la profito. La profito povas nur kreski rapide, se la prezo⁴⁶ de la laboro, se la relativa salajro same rapide malkreskas. La relativa salajro povas malkreski, kvankam la reala salajro samtempe kun la nominala salajro, kun la monvaloro de la laboro kreskas, sed nur ne en la sama proporcio kreskas kiel la profito. Se ekzemple en bonaj aferperiodoj la salajro kreskas je 5 elcento, la profito aliflanke je 30 elcento, tiam la relativa salajro *ne kreskis*, sed *malkreskis*.

Se do la enspezo de la laboristo pliĝas kun la rapida kresko de la kapitalo, tiam grandiĝas samtempe la socia abismo kiu disigas la laboriston disde la kapitaliston, tiam pliĝas samtempe la potenco de la kapitalo super la laboro, la dependeco de la laboro fronte al la kapitalo.

La laboristo havas intereson je rapida kresko de la kapitalo, tio signifas nur: Ju pli rapide la laboristo pliigas la fremdan riĉaĵon, des pli grasajn pecojn li ricevas, kaj des pli da laboristoj povas dungigi kaj ekzistiĝi, des pli la amaso da sklavoj dependaj de la kapitalo povas pliĝi.

Ni vidis do:

Eĉ la *situacio plej favora* por la laborista klaso, *kiom eble*

46 interŝanĝvaloro.

plej rapida kresko de la kapitalo, kiom ajn ĝi povas plibonigi la materian vivon de la laboristo, ne nuligas la kontraŭdiron inter liaj interesoj kaj la burĝaj interesoj, la interesoj de la kapitalisto. *Profito kaj salajro* staras daŭre en *inversa proporcio*.

Se la kapitalo kreskas rapide, tiam la salajro povas kreski; misproporcie pli rapide kreskas la profito de la kapitalo. La materia situacio de la laboristo pliboniĝis, sed je la kosto de lia socia situacio. La socia abismo, kiu disigas lin disde la kapitalisto, ampleksiĝis.

Fine:

Plej bona kondiĉo por la dunglaboro estas kiom eble plej rapida kresko de la produktiva kapitalo, tio signifas nur: Ju pli rapide la laborista klaso pliigas kaj grandigas la al ĝi malamikan potencon, la fremdan, super ĝi regantan riĉaĵon, sub des pli favoraj kondiĉoj estas al ĝi permesate labori denove por pliigo de la burĝa riĉaĵo, por pligrandigo de la potenco de la kapitalo, kontenta forĝi al si mem la orajn katenojn per kiuj la burĝaro trenas ĝin malantaŭ si.

⁴⁷ *Kresko de la produktiva kapitalo kaj kresko de la salajro*, ĉu ili estas vere tiom nedisigeble kunligitaj, kiel asertas la burĝaj ekonomikistoj? Ni ne kredu ilin tuj. Ni eĉ ne kredu ilin, ke, ju pli grasa la kapitalo, des pli grasiĝas ĝia sklavo. La burĝaro estas tro klera, ĝi kalkulas tro bone, por dividi la avantaĝojn de la feŭdulo, kiu pompas per sia servistaro. La ekzistkondiĉoj de la burĝaro devigas ĝin kalkuli.

Ni devas do pli detale analizi:

Kiel la kreskado de la produktiva kapitalo efikas sur la salajro?

47 *Antaŭmetite*: *Kolonjo, la 10-an de aprilo.

Se la produktiva kapitalo de la burĝaro kreskas ĝenerale, ti-
am okazas *pli multflanka* akumulado de laboro. La kapitaloj
kreskas je nombro kaj amplekso. La *pliigo* de la kapitaloj pliig-
as la *konkurencon inter la kapitalistoj*. La kreskanta amplekso
de la kapitaloj donas la rimedojn konduki *pli grandajn labor-
ist-armeojn kun gigantaj militinstrumentoj sur la industrian
batalkampon*.

Kapitalisto povas cedi alian kaj konkeri ties kapitalon nur
per tio ke li vendas pli malaltpreze. Por povi vendi pli malalt-
preze, sen ruiniĝi, li devas produkti pli malaltpreze, do kiom
eble plej altigi la produktoforton de la laboro. Sed la produkto-
forto de la laboro pliigeblas antaŭ ĉio per *pli granda divido de
la laboro*, per pli multflanka enkonduko kaj konstanta pliboni-
go de la *maŝinaro*. Ju pli grandas la laborist-armeo sub kiu la
laboro estas dividita, ju pli grandskale la maŝinaro estas enkon-
dukita, des pli malpliigatas relative la produktadkostoj, des pli
fruktodona fariĝas la laboro. Pro tio estiĝas ĉiuflanka konkura-
do inter la kapitalistoj por pliigi la labordividon kaj la maŝinar-
on kaj ekspluati ĝin kiom eble plej grandskale.

Se kapitalisto, per pli granda labordivido, per aplikado kaj
plibonigo de novaj maŝinoj, per pli avantaĝa kaj pli amasa eks-
pluatado de la naturfortoj trovis la rimedon per la sama sumo
da laboro aŭ da akumulita laboro krei pli grandan sumon da
produktoj, da varoj ol liaj konkurantoj, se li povas ekz-e en la
sama labortempo, en kiu liaj konkurantoj teksas duonan ulnon
da teksaĵo, produkti tutan ulnon da teksaĵo, kiel tiu kapitalisto
agos?

Li povus daŭre vendi duonan ulnon da teksaĵo je la ĝisnunaj
merkatprezo, sed tio ne estus taŭga rimedo cediĝi liajn kontraŭ-
ulojn kaj pligrandigi sian propran vendokvanton. Sed laŭ la sa-
ma mezuro laŭ kiu lia produktado ampleksiĝis, ampleksiĝis lia

bezono vendi. La pli potencaj kaj pli kostaj produktiloj, kiujn li estigis, ja *kapabligas* lin vendi sian varon pli malaltpreze, sed ili *devigas* lin samtempe *vendi pli da varoj*, konkeri multe *pli grandan* merkaton por siaj varoj; nia kapitalisto vendos do la duonan ulnon da teksaĵo pli malaltpreze ol liaj konkurantoj.

Sed la kapitalisto ne vendos la tutan ulnon ne tiom malaltpreze kiel liaj konkurantoj vendas la duonan ulnon, kvankam la produktado de la tuta ulno ne kostas al li pli ol al la aliaj tiu de la duona. Alie li ne gajnus ion kroman, sed nur rericevus la produktadkoston en la interŝanĝo. Lia ebla pli granda enspezo devenus do el tio ke li movas pli altan kapitalon, sed ne el tio ke li valorigis sian kapitalon pli alte ol la aliaj. Krome li atingas la celon kiun li volas atingi, se li fiksas la prezon de sia varo nur je kelka elcento malpli alte ol liaj konkurantoj. Li cedigas ilin, li konkeras almenaŭ parton de ilia vendokvanto, per tio ke li *vendas sub ilia prezo*⁴⁸. Kaj fine ni memoras ke la kuranta prezo⁴⁹ troviĝas ĉiam *super aŭ sub la produktadkosto*, laŭ tio ĉu la vendo de varo okazas en favora aŭ malfavora sezono de la industrio. Laŭ tio ĉu la merkaptoprezon de la ulno da teksaĵo estas sub aŭ super la ĝis nun kutimaj produktadkosto, la elcentaĵoj ŝanĝiĝas, per kiuj la kapitalisto, kiu aplikis novajn, pli fruktonajn produktilojn, vendas super siaj realaj produktadkosto.

Tamen la *privilegio* de nia kapitalisto ne daŭras longe; aliaj konkurantaj kapitalistoj enkondukas la samajn maŝinojn, la saman labordividon, enkondukas ilin je sama aŭ pli granda skalo, kaj tiu enkonduko tiom ĝeneraliĝos, ĝis kiam la prezo de la tolaĵo *fiksiĝos* ne nur *sub siaj malnovaj*, sed *sub siaj novaj produktadkosto*.

La kapitalistoj troviĝas do reciproke en la sama situacio, en

48 *En la germana originalo: unterkauft. -vl*

49 merkaptoprezon.

kiu ili troviĝis *antaŭ* la enkonduko de la novaj produktiloj, kaj se ili povas liveri per tiuj rimedoj sampreze la duoblan produkt-on, ili estas *nun* devigataj, liveri *sub* la malnova prezo la duoblan produkton. En la stadio de tiuj novaj produktadkostoj rekomencas la sama ludo. Pli da labordivido, pli da maŝinaro, pli grandskale ekspluateblas la labordivido kaj maŝinaro. Kaj la konkurenco alportas ree la saman kontraŭefikon kontraŭ tiu rezulto.

Ni vidas, kiel la produktadmaniero, la produktadrimedoj estas konstante ĝisfunde ŝanĝataj, revoluciataj, *kiel la divido de la laboro devige sekvigas pli grandan dividon de la laboro, la aplikado de maŝinaro pli grandan aplikadon de maŝinaro, la grandskala laborado pli grandskalan laboradon.*

Tiu estas la leĝo, kiu ĉiam ree elĵetas la burĝan produktadon el sia malnova relo kaj devigas la kapitalon streĉi la produktfortojn de la laboro, *ĉar ĝi streĉis ĝin, la leĝo, kiu ne lasas al ĝi trankvilon kaj konstante susuras al ĝi: Marŝ! Marŝ!*

Tiu leĝo estas neniu alia ol tiu kiu ene de la ŝanceliĝoj de la komercaj epokoj nepre *kompensas* la prezon de varo al ĝiaj *produktadkostoj*.

Kiom ajn gigantajn produktilojn kapitalisto aplikas, la konkurenco ĝeneraligos tiujn produktilojn, kaj ekde la momento, en kiu ĝi ĝeneraligis tiujn, la sola sukceso de la pli granda fekundeco de lia kapitalo estas, ke li devas nun liveri por la sama prezo 10-, 20-, 100-oble pli ol antaŭe. Sed ĉar li devas vendi eble 1.000-oble pli, por kompensi per la pli granda maso da vendita produkto la malaltan vendoprezon, ĉar amasa vendado nun necesas, ne por gajni pli, sed por anstataŭigi la produktadkostojn - la produktilo mem fariĝas, kiel ni vidis, ĉiam pli multekosta -, sed ĉar tiu amasa vendado fariĝis vivnepra demando ne nur por li, sed ankaŭ por liaj konkurantoj, la malnova batalo

rekomenas des pli akre, ju pli fruktodonaj fariĝis la jam inventitaj produktiloj. *La labordivido kaj la aplikado de maŝinaro do okazos senkompare pli grandskale.*

Kia ajn potencas la aplikataj produktiloj, la konkurantaro provas forrabi de la kapitalo la orajn fruktojn de tiu potenco, per tio ke ĝi reduktas la prezon de la varo al la produktadkostojn, per tio ke ĝi do laŭ la sama mezuro laŭ kiu eblas produkti pli malaltkoste, t.e. produkti pli per la sama sumo da laboro, faras nepra leĝo la pli malplikostan produktadon, la liveradon de ĉiam pli grandaj masoj da produkto por la sama prezsumo. Tiel la kapitalisto per siaj propraj klopodoj gajnus nenion ol la devigo liveri en la sama labortempo pli, per unu vorto, *pli malfacilajn kondiĉojn de la utiligo de sia kapitalo*. Dum la konkurantaro do konstante persekutas lin per sia leĝo de la produktadkostoj, kaj ĉia armilo, kiun li forĝas kontraŭ siaj konkurantoj, returniĝas kiel armilo kontraŭ lin mem, la kapitalisto provas konstante superruzi la konkurantaron, per tio ke li senpaŭze enkondukas novajn, ja pli multekostajn, sed pli malmultekoste produktantajn maŝinojn kaj labordividojn anstataŭ la malnovajn kaj ne atendas, ĝis kiam la konkurantaro malnovigis la novajn.

Se ni imagas nun tiun febran aktivecon samtempe sur la *tuta mondmerkato*, tiam kompreniĝas, kiel la kreskado, la akumulado kaj koncentriĝo de la kapitalo sekvigas seninterrompan, sin mem forrapidigantan kaj ĉiam pli gigantskale plenumatan labordividon, aplikadon de nova kaj perfektigon de malnova maŝinaro.

Sed kiel efikas tiuj cirkonstancoj, kiuj estas nedisigeblaj de la produktiva kapitalo, sur la determinado de la salajro?

La pli granda *labordivido* kapabligas unu laboriston fari la laboron de 5, 10, 20: Ĝi pligrandigas do la konkurencon inter la

laboristoj 5-, 10- kaj 20-oble. La laboristoj konkurencas inter si ne nur per tio, ke iu vendas sin pli malmultekoste ol la alia; ili konkurencas inter si per tio, ke unu faras la laboron de 5, 10, 20; kaj la *labordivido*, enkondukita de la kapitalo kaj konstante pligrandigita, devigas la laboristojn tiel konkurenci inter si.

Krome: Laŭ la sama mezuro, laŭ kiu la *labordivido* kreskas, la laboro *simpliĝas*. La aparta lerteco de la laboristo fariĝas senvalora. Li estas transformata en simplan, monotonan produktoforton, kiu devas apliki nek korpajn nek mensajn streĉofortojn. Lia laboro fariĝas laboro alirebla por ĉiuj. Pro tio premas lin konkurantoj de ĉiuj flankoj, kaj krome ni memoras, ke, ju pli simpla, ju pli facile lernebla estas la laboro, des malpli da produktadkostoj ĝi necesas por alproprigi ĝin, des pli profunde malkreskas la salajro, ĉar kiel la prezo de ĉia alia varo ĝi estas determinata de la produktadkostoj.

Do, laŭ la sama mezuro, laŭ kiu la laboro fariĝas pli malkontentiga, pli abomena, laŭ la sama mezuro pliiĝas la konkurenco kaj malpliiĝas la salajro. La laboristo provas konservi la kvanton de sia salajro per tio ke li laboras pli, ĉu per laborado dum pli da horoj, ĉu per tio ke li liveras pli en la sama horo. Pelata de la mizero, li do ankoraŭ pliiĝas la jam malfeliĉigajn efikojn de la labordivido. La rezulto estas: Ju pli li laboras, des malpli da salajro li ricevas, kaj tio pro la simpla kialo ke li sammezure konkurencas siajn kunlaborantojn, faras do el siaj kunlaborantoj same multajn konkurantojn, kiuj ofertas sin je la samaj malbonaj kondiĉoj kiel li mem, ĉar li do lastinstance konkurencas sin mem, sin mem kiel membron de la laborista klaso.

La maŝinaro estigas la samajn efikojn multe pli grandskale, per tio ke ĝi elŝovas lertajn laboristojn per nelertaj, virojn per virinoj, plenkreskulojn per infanoj, per tio ke la maŝinaro tie, kie ĝi estas nove enkondukita, ĵetas la manlaboristojn amase

sur la straton, kaj tie, kie ĉi estas kompletigita, plibonigita, anstataŭigita per pli fruktodonaj maŝinoj, eksigas laboristojn en malgrandaj amasoj. Ni rapide priskribis supre la industriajn militon de la kapitalistoj inter si; *tiu milito havas la apartan trajton ke la bataloj en ĝi gajniĝas malpli per rekrutado ol per maldungo de la laborista armeo. La militestroj, la kapitalistoj, konkuras inter si pri kiu povas maldungi la plej multajn industri-soldatojn.*

La ekonomikistoj tamen rakontas al ni, ke la laboristoj, kiuj fariĝis superflujaj pro la maŝinoj, trovas *novajn* dungobranĉojn.

Ili ne kuraĝas rekte aserti, ke la samaj laboristoj, kiuj estas maldungitaj, trovas dungon en novaj laborbranĉoj. La faktoj kriegas tro laŭte kontraŭ tiu mensogo. Ili envere asertas nur, ke por aliaj partoj de la laborista klaso, ekz-e por la parto de la juna laboristgeneracio, kiu jam pretis eniri en la pereintan industribranĉon, malfermiĝas novaj dungeblecoj. Tio estas kompreneble granda kontentigo por la falintaj laboristoj. Al la sinjoroj kapitalistoj ne mankos freŝa ekspluatebla karno kaj sango, oni lasos la mortintojn enterigi siajn mortintojn. Ĝi estas pli ĝuste nur konsolo kiun la burĝoj donas pli al si mem ol al la laboristoj. Se la tuta klaso de salajruloj estus neniigita de la maŝinaro, kia teruro por la kapitalo, kiu sen dunglaboro ĉesas esti kapitalo!

Sed supozate, ke tiuj de la maŝinaro rekte elŝovitaj el la laboro kaj la tuta parto de la nova generacio, kiu jam atendis fari tiun servon, *trovas novan laboron*. Ĉu oni kredas, ke tiu estos same alte pagata kiel la perdita? *Tio kontraŭdirus ĉiujn leĝojn de la ekonomio*. Ni vidis, kiel la modernan industrion akompanas ĉiam la substituado de pli simpla, pli subordigita laboro al la kompleksa, pli alta.

Kiel laborista amaso, elĵetita de la maŝinaro el industribran-

ĉo, povus trovi rifuĝon en alia, krom se ĝi estas *pli malalte, pli malbone pagata?*

Oni citis kiel escepton la laboristojn, kiuj laboras en la fabrikado de la maŝinaro mem. Ekde kiam pli da maŝinaro estas postulata kaj konsumata en la industrio, la maŝinoj devus nepre pliiĝi, do la maŝinfabrikado, do la dungo de la laboristoj en la maŝinfabrikado, kaj la laboristoj aplikataj en tiu industribranĉo estas lertaj, kaj eĉ kleraj laboristoj.

Ekde la jaro 1840 tiu jam antaŭe nur duonvera aserto perdis ĉian ŝajnon, ĉar ĉiam pli multflankaj maŝinoj estas aplikataj por la fabrikado de maŝinoj ne malpli ol por fabrikado de kotonfadeno, kaj la laboristoj dungitaj en la maŝinfabrikoj, fronte al ege altteĥnologijaj [maŝinoj], povis ludi jam nur la rolon de ege primitivaj maŝinoj.

Sed anstataŭ la viron maldungitan pro la maŝino, la fabriko dungas eble *tri* infanojn kaj *unu* virinon! Kaj ĉu la salajro de la viro ne devis sufiĉi por la tri infanoj kaj unu virino? Ĉu la minimuma salajro ne devis sufiĉi por konservi kaj pliiĝi la rason? Kion pravas do tiu ŝatata burĝa diro? Nenion alian ol ke nun kvaroble da laboristaj vivoj estas konsumataj ol antaŭe, por perlabori la vivrimedojn de *unu* laborista familio.

Ni resumu: *Ju pli la produktiva kapitalo kreskas, des pli ampleksiĝas la labordivido kaj la aplikado de maŝinaro. Ju pli ampleksiĝas la labordivido kaj la aplikado de maŝinaro, des pli ampleksiĝas la konkurenco inter la laboristoj, des pli ŝrumpas ilia salajro.*

Kaj krome la laborista klaso rekrutiĝas ankoraŭ el la *pli altaj tavoloj de la socio*; amaso da malgrandaj industriistoj kaj malgrandaj rentuloj falas en ĝin, kiuj havas nenion pli urĝan por fari ol levi siajn brakojn apud la brakoj de la laboristoj. Tiel

la arbaro de alten streĉitaj kaj laboron postulantaj brakoj fariĝas ĉiam pli densa, kaj la brakoj mem fariĝas ĉiam pli malgrasaj.

Ke la malgranda industriisto ne povas elteni la batalon⁵⁰, en kiu unu el la plej ĉefaj kondiĉoj estas produkti ĉiam pli grand-skale, do esti granda kaj ne malgranda industriisto, tio estas memkomprenebla.

Ke la interezo de kapitalo malpliĝas sammezure kiel la maso kaj nombro de la kapitalo pliiĝas, kiel la kapitalo kreskas, ke pro tio la eta rentulo jam ne povas vivi per sia rento, do devas komenci per industrio, kaj do helpas pliiĝi la vicojn de la etindustriistoj kaj per tio la kandidatojn por la proletaro, ĉio ĉi certe ne bezonas plian argumentadon.

Laŭ la sama mezuro fine, kiel la kapitalistoj per la supre priskribita moviĝo estas devigataj ekspluati jam ekzistantajn gigantajn produktadrimedojn pli grandskale kaj tiucele movi ĉiajn risortojn de kredito, laŭ la sama mezuro pliiĝas la industriaj tertremoj, en kiuj la komerca mondo konserviĝas nur per tio ke ĝi ofertas parton de la riĉaĵo, de la produktoj kaj eĉ de la produktadrimedoj al la dioj de la submondo - per unu vorto pliiĝas la *krizoj*. Ili plioftiĝas kaj pliakriĝas jam pro tio ĉar laŭ la sama mezuro laŭ kiu la produktmaso, do la bezono pri etenditaj merkatoj kreskas, la mondmerkato ĉiam pli ŝrumpas, ĉiam restas malpli da novaj ekspluateblaj merkatoj, ĉar ĉiu antaŭa krizo subigis iun ĝis nun nekonkeritan aŭ de la komerco nur supraĵe ekspluatitan merkaton al la mondkomerco. Sed la kapitalo *vivas* ne nur de la laboro. Estante samtempe distingita kaj barbara mastro, ĝi tiras kun si en la tombon la kadavrojn de siaj sklavoj, tutajn laborist-hekatombojn kiuj pereas en la krizoj. Ni vidas do: Se la kapitalo kreskas rapide, tiam kreskas senkompare pli rapide la konkurenco inter la laboristoj, do des pli mal-

50 militon.

kreskas relative la dungrimedoj, la vivrimedoj por la laborista klaso, kaj tamen la rapida kresko de la kapitalo estas la plej favora kondiĉo por la dunglaboro.⁵¹

51 *Postmetite*: (Daŭrigo sekvas) Karl Marx.

Postparolo de la tradukinto

Jen unu el la relative fruaj verkoj de Markso, verkita nur iom post la fama *Manifesto de la Komunista Partio*. Kelkaj nocioj ankoraŭ ne trovis sian definitivan formon, la aŭtoro uzas ankoraŭ ekz-e *laboro*, por la nocio kiu poste ricevis la pli precizan terminon *laborforto*. Tiun mankon - kaj kelkajn preserarojn - riparis Frederiko Engelso en la eldono de la jaro 1891, kiun li prizorgis kaj kiun sekvas tiu ĉi traduko.

Mi sekvis ĝin ankaŭ en la piednotoj⁵², kun kelkaj esceptoj: mi ellasis ĉiajn piednotojn kiuj koncernas nur lingvajn diferencojn de la germana lingvo, kiuj ne koncernas nian lingvon. Krome mi ie kaj tie aldonis proprajn rimarkojn piednote, signifajn per -vl. Rimarkoj kiujn mi aldonis en la teksto mem estas metitaj inter rektaj krampoj.

Kiel Markso mem skribis en la enkonduko, li celis per tiu ĉi teksto esti komprenata de la laboristoj, kaj pro tio premisis nenian sciojn pri „*eĉ la plej elementaj nocioj de la politika ekonomio*”. Ĝuste pro tio mi pensas ke tiu verketo povas esti utila ankaŭ niatempе, ĉar multas la homoj kiuj volas kontribui al starigo de „*alia mondo*” kaj certe al *pli bona mondo*, sed samtempe estas vole-nevole trempitaj de la burĝa ideologio inkluzive de ties parte ducentjaraj ekonomikaj kliŝoj, kiuj ne korekteblas simple per la bona volo, sed nur per klara pensado pri la plej gravaj ekonomisciencaj temoj.

Al tiuj amikoj, kiuj asertas ne interesiĝi pri ekonomio nek pri politika ekonomio aŭ pri ia ajn temo de ekonomia scienco, mi respondu ke ĉi tie, kiel diras Markso mem en la enkonduko

52 La piednotoj montras la version de la unua, gazetara, eldono de 1849 tie kie ĝi malsamas.

al tiu ĉi teksto, li priskribas „*la ekonomiajn kondiĉojn mem, sur kiuj la ekzistado de la burĝaro kaj ties klasa regado baziĝas same kiel la sklaveco de la laboristoj*”. Tiu, kiu ne okupiĝas pri la kondiĉoj de la klasa regado, povas nur vane klopodi por konstrui „alian mondon eblan”.

Pro tio, kaj krome ĉar tiu ĉi verketo estas sufiĉe konciza kaj mallonga, kaj kvankam ĝi estas nur fragmento, ĝi povas utili por fari la unuajn paŝojn en la entrepreno kompreni la nunan kapitalismon.

Mi ĝojas ke tiu ebleco konatiĝi kun bazaj verkoj de Karlo Markso prezentiĝas nun ankaŭ nialingve: kun la *Manifesto de la Komunista Partio*, tradukita de Detlev Blanke, kaj la pli posta verko, *Salajro, prezo kaj profito*, en mia traduko, lia verko pri la Pariza Komunumo 1871 - la unua socialisma socio - sub la titolo *La interna milito en Francio*, kaj kolektaĵo de citaĵoj el la verkoj de Markso, *Markso hodiaŭ. Nerefuteblaj citaĵoj* akireblas nun kvar gravaj tekstoj de Markso - kaj unu citaĵaro.

Kvankam tio povas esti nur komenco - ĉar iam devas aperi nialingve ankaŭ interalie lia plej profunda analizo de la politika ekonomio, *La kapitalo*, - la nun jam alireblaj tekstoj taŭgas tute bone por komenci la promenadon en la regnon kiu regas niajn agojn kaj parte eĉ niajn pensojn.

Vilhelmo Lutermano

Pedro Betancourt, en februaro 2009

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de *Le Monde diplomatique en Esperanto* <http://eo.mondediplo.com> volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en tiu ĉi libro. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj. Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado - ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj:

- **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

- **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, en trad. de V. Lutermano, 2007

- **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), en traduko de V. Lutermano, 2007

- **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

- **GBEGLO Koffi: Esperantuĵismo**, originale verkita, 2008

- **Johano Besada: Eseoj**, originale verkitaj, 2008
- **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. V. Lutermano, 2008
- **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. Amparado Cisnero, 2009
- **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de V. Lutermano, 2009
- **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj**
- Tekstoj Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009
- **Karlo Markso: Dunlaboro kaj kapitalo**, trad. V. Lutermano, 2009 (tiu ĉi libro)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Enpaĝigita de Monda Asembleo Socia (MAS)
per OpenOffice 3.0.0 sub Mandriva Linukso 2009.0
en februaro 2009 kun litertiparo Liberation Serif kaj Liberation Sans.
Presita 2009 en Germanio